Walter Klag
Josef Kříž
Liette Lêla De Queiroz Pessoa
Alfred Heiligenbrunner
Leonid Turkadze

# SAT.IROJ




## Dektria kajero

13a kajero
Unua eldono Vieno 2021

KREDU NENION, KION VI NE MEM MENSOGIS!




Se la sat.iroj plaĉas al vi, bonvole sendu ilin al viaj geamikoj!

Aliaj numeroj estas elŝuteblaj en Bitoteko, serĉo: satiroj.

Foto sur la kovrilpaĝo de Walter Klag
Rejkjaviko 2013

## HAVO ENA

Ŝercaro bonega

Albumo finvenka

Enketo demokratia

Voko ala

# ŜERCARO BONEGA

Ĉefo de granda firmao preskaŭ dronas en akvo, sed lia metilernanto savas lian vivon.
La ĉefo diras: „Mi estas tre dankema al vi. Vi havas unu deziron libera. Finfine vi ja savis mian vivon. Pripensu!"
La metilernanto pripensas. Finfine li diras: „En la firmao bonvole al neniu rakontu, ke estis mi, kiu savis vin!"

A. H.

Dentokuracisto al paciento: „Tio povas iom dolori.“
Paciento: „Ne problemo.”
Dentokuracisto: „Mi havas amrilaton kun via edzino ekde tri jaroj.“


Gravedulino en bakejo: „Mi ricevas panon.”
Bakisto: „Nekredeble!”

Gepatroj al filo: „Vi adoptiĝis!”
Filo: „Skandalo! Mi volas konatiĝi kun miaj veraj gepatroj!“
Patro: „Ni estas viaj veraj gepatroj. Viaj novaj venos tuj. Preparu vin por forveturo!“

Paciento: „Saluton, sinjoro doktoro!“
Kuracisto: „Vi havas okulmalsanon.“
Paciento: „Kial vi scias tion?”
Kuracisto: „Vi parolas kun mia printilo!”

Ovo vidas alian ovon kaj demandas: „Kial vi havas tiom da haroj?”
„Ĉar mi estas kivo!”

Du amikinoj, kiuj longe ne renkontiĝis, babilas.
„Ĉu vi estas ankoraŭ la fianĉino de Petro?“
„Ne plu.“
„Bona decido. Li estas vera idioto kaj fetoras!“
„Mi estas nun lia edzino.“



Kuracisto (mallaŭte): „Mi ne trovas, mi ne trovas ...“
Paciento (timas): „Kion? Ki-kion?”
Kuracisto: „Vian limdaton.”

Kio havas dek mil piedojn kaj povas flugi?
5000 birdoj.

„Patro, kio estas transvestito?“
„Demando la patrinon. Li scias tion.”

„Mi estras firmaon, sed mankas la ekonomia sukceso.”
„Kial?”
„Mi prunte donas brullignon.“

Paciento: „Mi estas ege nervoza. Tio estas mia unua operacio.”
Kuracisto: „Ankaŭ mia.”

„Patro, antaŭ nia domo estas viro, kiu kolektas por la pensiulejo.”
„Tre bona! Doni al li la geavojn.”

Pentraĵo „Du virinoj ĉe tablo” de August Macke [aŭgust make], 1910, oleo sur kartono, 58 × 64,5 cm. Privata posedaĵo.

## EN MALSANULEJO

- La kaŭzo de la morto de via edzo estas koronviruso.

- Ne, sinjoro doktoro, mia edzo mortis pro infarkto.

- Kial li malsaniĝis pro infarkto?

- Li ege nervoziĝis .....

- Kaj kio lin nervozigis?

- Li estis senlabora.

- Kial oni maldungis lin?

- Kiel multajn pro koronviruso.

- Kaj tion mi ja diris!

L. T. kaj W. K.

## ALBUMO FINVENKA

RUBOradio

Rubo
HAZARDOUS WASTE
MANAGEMENT LTD






LIGNO®

Konfigurierbares Brettsperrholz



FinGro
WEALTH cc

fingro
FINANCIAL MANAGEMENT




Als je 't mij vraagt:
CHIRO
HAKILO

chiro



REBATAS
GLOBAL MARKETPLACE

M&T
8
AGRABLA

rebatas.co.uk

RIDAS
Revista Iberoamericana de Aprendizaje Servicio
Solidaridad, ciudadanía y educación

REVIDAS
recuperando vidas

REVIDAS
Restaurando Vidas

PLAGO
A PLATFORM FOR LIVING. GO PLAY.

PLAGO
professionals

PLAGO
HOTEL

SG
SUKCESO
GRADNJE

维途
VETURIS




Krono Original
High Quality
Made by Kronospan

Rochelle Veturis



Trinkas

Centro de Estudos




AC

TRiNKiS

20 03




BIERON

Pièces Autocars

depuis 1964




oleon

a natural chemistry







TEON

THERAPEUTICS, INC.




Sukōn

# ENKETO DEMOKRATIA

Renomaj geeksperoj jam ofte certigis, ke la vorto „viruso” estas diskriminacianta. Tial la Nova Akademio de Esperanto NADE proponas alian terminon. Elektu per faro de kruceto unu varianton kaj skribu vian opinion al la redakcio: nade@nade.eo!

□ virinuso
□ virusino
□ inviruso
□ inusviro
□ usinviro
□ usvirino
□ Mi ne korespondas kun kompletaj idiotoj!
□ Mi tuj malabonas la sat.irojn!

Subskribo: Gastono Varingieno la Nepo, prezidantego de NADE

# ALVOKO

Bonvolu sendi al la redakcio vian kontribuaĵon.
Malbonajn ŝercojn la redakcio profesie plibonigos.
Se temas pri politiko, religio aŭ fi-lozo-fi-o turnu vin al la gazeto „La Kancerinkliniketo”.

Eternan dankon!

La tuta redakcio

# La plej sekura lingvo




Foto: Kultura Centro “Esperanto” en Fulda, Germanio.
Okaze de demonstracio en Dannenröder Forst

Warum so viele Polizei-Mannschaftswagen rund ums Esperanto standen:
20. 11. 2020 - Das Kongress- und Kulturzentrum Esperanto in Fulda war am letzten Wochenende bestens bewacht - womöglich der sicherste Ort in ganz Osthessen. Viele Mannschaftswagen der Polizei standen rund um das Vier-Sterne-Superior-Hotel nahe dem ICE-Bahnhof - und das lockte Passanten, teils mit neugierigen Blicken, an.
"Beim Esperanto ist ein großer Polizeieinsatz", teilte ein besorgter Anrufer am Sonntagabend unserer Redaktion mit und fragte: "Wissen Sie was?" OSTHESSEN|NEWS kann nach entsprechenden Recherchen nun Entwarnung geben: Es war kein Einsatz am Esperanto, es bestand keine Gefahr.
Hintergrund: Beamte der Bereitschaftspolizei von Nordrhein-Westfalen (NRW) sind in die Großeinsatzlage rund um den Weiterbau der A49 im Dannenröder Forst eingebunden, bei dem täglich weit über 1.000 Polizisten aus Hessen und benachbarten Bundesländern eingesetzt sind. Teils über mehrere Tage - und dafür braucht es entsprechende Übernachtungsmöglichkeiten.
So waren ein Großteil der NRW-Hundertschaften im Esperanto untergebracht. Das Haus verfügt über 327 Zimmer und ist damit das größte Hotel der Region. Dort konnten auch die Einsatzfahrzeuge nachts gut geschützt werden, wie O|N erfuhr. Mittlerweile ist die Polizei aus dem Tagungshotel wieder abgerückt - der Einsatz im "Danni" läuft aber weiter. (Christian P. Stadtfeld)

Kontribuaĵoj de Josef Kříž, Ĉeĥio




Esperanta versio de Liette LÊLA De Queiroz Pessoa el Brazilo

"Mia edzino aktuale dediĉas sin al humanitara laboro.
Ŝi kuiras supon por senhejmuloj. "
"Kaj kiaj estas ŝiaj rezultoj?"
"Bonege, duono el ili preferas trovi laboron."

Viro lavas la plankon, lia edzino sidas sur seĝo kaj legas ĵurnalon.

La viro diras: "Levu viajn piedojn, por ke mi povu viŝi la plankon sub vi."

Ŝi: "Ĉu vi eĉ ne povas lavi la plankon sen mia helpo?"

# Tie-ĉi mankas viaj kontribuaĵoj!

# Bonvole sendu ilin al la redakcio:

# esperanto@chello.at